

La artikolo

Ĉe franclingvanoj, imitado de la franca ne ĉiam kondukas al bona uzo de Esperanto. Ĉi-sube tiu ĉi aserto estos ilustrita kaze de la uzo de artikolo (partikulo).

Apriore la afero estas relative simpla :

	difinita	nedifinita	partitiva
franca (artikoloj)	le, la, les	un, une, des / de	du, de la
Esperanto (partikulo)	la		

Noto : en negativaj propozicioj, la afero estas iom malsama : « de » plej ofte anstataŭas la nedifinitajn kaj partitivajn artikolojn.

Noto : ne ekzistas plurala partitiva artikolo en la franca.

La afero estas do simpla en Esperanto kondiĉe ke oni ne estu influata de la franca, kies funkciado ne ĉiam konformiĝas al la ne tro malsimpla prezentado de tiu tabelo.

Okaze de rekta redakto en Esperanto, solvo estas konsilinda : forgesu la francan. Okaze de tradukado, la malplej malbona solvo estas procedi laŭ du sinsekvaj « tradukoj », nome : 1. traduko al mensa bildo de la signifo (do ne plu ligita al la deira lingvo) ; 2. tuj poste redakto en la celolingvo Esperanto.

La signifon oni traduku, ne la francan lingvon.

Tamen, por tiuj kiuj emas sisteme deiri de la pensmaniero de sia naskolingvo, jen ĉi-poste kelkaj punktoj pri kiuj oni devas atenti okaze de elfrancigo.

Neripeto de la artikolo

En la franca neripeto de la artikolo estas ebla. En Esperanto tio ne estas ebla ĉar manko de artikolo indikas nedifinitecon de la (nevidebla) artikolo.

« les cuillères et fourchettes » signifas « la kuleroj kaj la forkoj ».

« la kuleroj kaj forkoj » signifus « les cuillères et des fourchettes ».

Same pri : « les fruits et légumes » / « la fruktoj kaj la legomoj »

« l'histoire et géographie » / « la historio kaj la geografio »

Partitiva artikolo kaj kunigo de prepozicio kun difinita artikolo

« du », « de la » kaj « des » estas uzataj en du tre malsamsignifaj situacioj, kiel tion ilustras la jenaj ekzemploj :

Prepozicio kaj difinita artikolo

Elle parle [de la](#) femme [du](#) voisin / Ŝi parolas [pri la](#) edzino [de la](#) najbaro

Elle parle [des](#) voisins / Ŝi parolas [pri la](#) najbaroj

Partitivaj artikoloj

Tu bois [de la](#) bière et manges [du](#) pain / Vi trinkas bieron kaj manĝas panon

Nedifinitaj artikoloj

Tu manges [des](#) pommes / Vi manĝas pomojn

Ankaŭ la franclingvaj vortoj « au » kaj « en » povas foje kaŝi difinitan artikolon :

Je vais [au](#) village / Mi iras [al la](#) vilaĝo

Je vais [en](#) ville / Mi iras [al la](#) urbo

Ĝeneraligo

Kiam oni esprimas ion ĝeneralan, la pluralo de la nedifinita artikolo de la franca (« un, une ») logike fariĝas difinita (« les »). En Esperanto, oni prave ignoras la subtilaĵon. Ekzemple :

[Un](#) lion est un mammifère / Leono estas mambesto

[Les](#) lions sont des mammifères / Leonoj estas mambestoj

Noto : Eblas diri « [Le](#) lion est un mammifère » sed tiam la signifo estas « [La specio](#) leono estas mambesta »

Similaj ekzemploj :

[Un](#) cube est un polyèdre / Kubo estas pluredro

[Les](#) cubes sont des polyèdres / Kuboj estas pluredroj

[Une](#) plante (, ça) pousse quand il pleut / Planto kreskas sekve de pluvo

[Les](#) plantes poussent quand il pleut / Plantoj kreskas sekve de pluvo

Noto : La senpartikula plurala formo en Esperanto pli nete evidentiĝas ke la pluralo, eĉ se kutima, ne estas utila, kaj apenaŭ alportas nuancon de konfirmo (redundance). La singulara formo, eĉ se ne eksplicite, sufiĉe klare sugestas « iu ajn... el ... » (kvantizanto ∀).

Uzo de artikolo por doni apartan signifon

Foje la artikolo implicas la sencon de la sekvanta substantivo.

[le](#) pavé, [le](#) gravier, [le](#) grain, [la](#) poussière / [la](#) pavimo, [la](#) gruzo, [la](#) greno, [la](#) polvo

[les](#) pavés, [les](#) graviers, [les](#) grains, [les](#) poussières / [la](#) pavimeroj, [la](#) gruzeroj, [la](#) greneroj, [la](#) polveroj

[un](#) pavé, [un](#) gravier, [un](#) grain, [une](#) poussière / pavimero, gruzero, grenero, polvero

Noto : tamen pli malofte en kelkaj frazoj, la kunteksto devigas kompreni :

Le pavé, le gravier, le grain, la poussière / la pavimero, la gruzero, la grenero, la polvero

Ekzemploj iom similaj :

[l'](#) ennui, [la](#) distraction, [l'](#) assise / [la](#) enuo, [la](#) malatento, [la](#) bazo

[les](#) ennuis, [les](#) distractions, [les](#) assises / [la](#) zorgoj, [la](#) distraĵoj, [la](#) asizoj

[un](#) ennui, [une](#) distraction / zorgo, distraĵo

[des](#) ennuis, [des](#) distractions / zorgoj, distraĵoj

Kazo eĉ pli aparta :

faire [l'](#)appel / nomvoki

faire [un](#) appel / helpvoki

faire appel / apelacii